BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

57a jaro n° 5
oktobro - novembro - decembro

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

redakcio : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :
Dr. Pol Denoël  Durwael Ivo  Iserentant Roger

administrado : Terryn J. Raapstraat, 72 Gent


## Belga Esperanto-Federacio

asocio sen profita celo

sidejo & prezidantejo
Debruynlaan 44, Wilrijk tel. (03) 377758

honora prezidanto
Kempeneers Paul

honora vicprezidanto
Sielens Henri

ĝenerala prezidanto
Jaumotte Maurice

honora vicprezidantino
Plyson J.

prezidantoj
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

unua vicprezidanto
Roose Fernand

vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

ĝenerala sekretario
De Roover R., Luchtvaartstraat 28 Borgerhout

sekretario por la nederlandlingva regiono
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr 51, St-Kruis tel. (050) 34935

sekretario por la franclingva regiono
De Cuyper Georges, 66, rue de Dorlodot, Monceau sur Sambre

kasistino Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 Raapstraat, 72, Gent

ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
p.k. 9051.25

# 48-a KONGRESO DE BEF
## 28, 29 & 30.5.1966
## LOVENO

La bela kongreso de Oostende devas havi belan sekvon en Loveno. Al tio laboras diligente kaj entuziasme niaj geamikoj de tiu universitata, malnov-Brabanta urbo. Jam multaj aliĝis en Oostende. Ni petas kaj esperas ke depost nun rapide envenos la aliaj aliĝoj. Ju pli frue kaj amase ili envenas despli ni povos havi multflanke interesan kongreson. Jen sekvas la alloga, provizora programo :

### PROVIZORA PROGRAMO

**Sabato 28.5.1966**

| | | |
|---|---|---|
| 14-a | horo : | malfermo de la akceptejo kaj de la kongresgiĉetoj. |
| 16-a | horo : | kunsido de la administrantaro de BEF |
| 17-a | horo : | vizito al la universitata Biblioteko. |
| 19.30-a | horo : | oficiala malfermo : enkonduka parolado de la LKK-Prezidanto, D-ro Piot ; salutoj de la oficialaj reprezentantoj kaj de la grupoj de BEF. Festparolado de S-ro M. Jaumotte, ĝenerala Prezidanto ; poste distra vespero. |

**Dimanĉo 29.5.1966**

| | | |
|---|---|---|
| 9-a | horo : | malfermo de la giĉetoj - Diservo. |
| 10-a | horo : | kunsido de BEF - poste akcepto en la urbodomo. |
| 12.30-a | horo : | fotografado. |
| 15-a | horo : | promenado al la granda Beginejo ; vizito al pentraĵekspozicio ; eventuale : muzeo Vander Kelen. |
| 19.30-a | horo : | Bankedo - Balo - Tombolo. |

**Lundo 30.5.1966**

| | | |
|---|---|---|
| 9-a | horo : | Ekskurso per aŭtoĉaro : vizito al la abatejo de Park-Heverlee (Norbertanoj) ; restado ĉe « Zoete Waters » (Oud-Heverlee) - okazo por boatveturado - okazo por promeni ĉirkaŭ la lago kaj en la arbaro. |
| 13-a | horo : | forveturo al Tervuren ; vizito al la Kongo-Muzeo sub gvidado - promenado en la rava parko - vespermanĝo - forveturo. |

La aliĝiloj estos aldonitaj al la sekvanta numero de SONORILO, sed vi jam povas enskribi pagante la kongreskotizon de 100 fr. (ĝis la 31.3.1966) al la PK de S-ino Meurrens, Naamsestraat, 78, Leuven, n° 407002.

## AL GEINSTRUISTOJ KAJ GEPROFESOROJ — (ESPERANTISTOJ)

Montriĝis la ebleco ion atingi por Esperanto en la medio de la ministerio de publika instruado. Por sukcesplene labori estas necese ke ni disponas pri listo de ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj kiuj konas nian lingvon kaj kiuj pretas ion fari. Do anoncu vin tuj aŭ ĉe Drs. F. Roose en Brugge, St. Klaradreef 59 ; aŭ ĉe Drs. Wim De Smet, Drogenberg 36, Overijse. Tiu-ĉi alvoko estas grava kaj urĝa !

## REĜINO ELISABETH

Nia lando kaj la belgoj ĝenerale estis profunde trafitaj pro la morto de la Reĝino-Avino Elisabeth, vidvino de Reĝo Alberto.

Ŝi mem estis plurfoje kruele trafita de la Sorto : la unua Mondmilito, en la unuaj jaroj de la regno de ŝia Edzo ; la subita akcidenta morto de la Reĝo ; la same subita kaj akcidenta morto, — apenaŭ unu jaron poste, — de Reĝino Astrid ; la dua Mondmilito kaj ĝiaj sekvoj, ankaŭ en familia rondo, tamen ne sukcesis detrui ŝian vivoforton kaj, ĉiam, la cirkonstancoj devigis ŝin repreni ŝian rolon de aganta Reĝino.

Tio okazis post la vidviĝo de Reĝo Leopoldo ; tio reokazis dum la vic-reĝeco de Princo Karolo kaj ankaŭ dum la fraŭlaj jaroj de la juna Reĝo Baldvino.

Sed ŝi ne limigis sian laboron je tio, kion oni dece povas esperi de Reĝino, en nia lando. Ŝia karaktero igis ŝin fari multe pli... Kaj ne nur la soldatoj de la unua Mondmilito, sed multaj aliaj homoj, speciale en la artistaj medioj, konservas pri Ŝi tutspecialan memoron.

Ŝi ne estis Esperantistino... Sed Ŝi, — per la studado de pluraj lingvoj, inter kiuj eĉ la rusa, — volis realigi sian grandan emon ekkoni la popolojn kaj fratiĝi kun ĉiuj homoj en la mondo.

Ĉe la enteriga ceremonio, Kardinalo Suenens nomis Ŝin « Reĝino sen Limoj » : Ne temis nur pri tiu landa senlimeco, kiu igis ŝin, — kuraĝe kaj sen timo pro eblaj miskompreno kaj riproĉo, — forvojaĝi al plej foraj landoj, apartenantaj al alia politika sistemo ; sed al la senlimeco de ŝia interesiĝo pri ĉio spirita kaj de ŝia korsindono por ĉiuj, kiuj bezonis, ĉu ŝian helpon, ĉu ŝian apogon.

Ŝi ripozu en Paco !

| NUR POR MEMBROJ KIUJ REKTE PAGAS AL LA FEDERACIO | | IZOLULOJ |
|---|---|---|
| KATEGORIOJ | | KOTIZO 1966 |
| **Naciaj** | | |
| BM | Bonfaranta membro | 200 |
| M | Membro | 125 |
| FM | Familia membro | 50 |
| JM | Junula membro (16 - 25) | 50 |
| KM | Kadeta membro (ĝis 16) | 25 |
| | Kursanoj | 50 |
| | Abono | 100 |
| **Internaciaj** (U.E.A.) | | |
| MJ | Membro kun jarlibro | 135 |
| MA | Membro-Abonanto | 270 |
| MS | Membro subtenanta | 400 |
| Ab.+J-MA | Juna membro ĝis 21 jara | 200 |
| J-MJ | | 65 |
| DV | Dumviva membro | 5.400 |

**LA GRUPKASIST(IN)OJ BONVOLU SENDI LA MEMBROLISTON EN TRI EKZ.**

**DANKON.**



# BELGA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO

## HISTORIO DE LA JUNULARA MOVADO . . .

S-ro Karel BRAET nuntempe estas la ĝenerala sekretario de la « Konga Esperanto Instituto ». Sed iam li ludis gravan rolon en la junulara movado en Belgujo, kaj li skizis por ni la periodon antaŭ la fondiĝo de BEJA . . .

« . . .Ĝi startis en 1938 kaj F-ino Denise . . . (mi ne plu memoras la nomon), instruistino el Harelbeke estis la ĉefperantino de TJO por Belgujo. Jam en 1938 ekzistis junulara Esperantogrupo en porinstruista lernejo de Blankenberge kun pli ol 40 anoj. Amiko Roger COSIJNS kaj mi gvidis la kursojn, kaj tri anoj partoprenis la 2-an internacian junularkunvenon en Tervuren en 1939 (COSIJNS, ITTERBEEK kaj mi). Okazis post la internacia kunveno, landa kunveno en Diksmuide, kun proksimume dek partoprenintoj (preskaŭ ĉiuj membroj de la junulara grupo « Norda Stelo » el Blankenberge). Poste venis la milito kaj ĉia agado ĉesis. Mi mem estis dummilite enkarcerigita fare de la germanoj, sed tamen havis la ŝancon atingi la finon, vivanta ! Tuj post la milito, ekde la komenco de 1945, mi kontaktis la TJO-estraron en Nederlando, kaj fariĝis la ĉefperanto de TJO por Belgujo. En 1946, la belga sekcio de TJO organizis la tutunuan internacian junularan Esperanto-kunvenon post la milito, en Blankenberge. Ĉeestis gejunuloj (precipe gvidantoj — sed tamen junaj) el Belgujo, Nederlando, Francujo, Svedujo, Svisujo, kaj Britujo ! Ĝi daŭris kvar tagojn. Estis do internacia TJO-kunveno, t.n. « konferenco ». Mi ĉiam miris dum postaj jaroj, kiam mi vidis ke oni neniam menciis tiun kunvenon en la listo de la internaciaj junularkongresoj kiuj komencis ekde Groet. Nu, je tiu momento ekzistis junularaj Esperanto-grupoj en Blankenberge (porinstruista lernejo), en Oostende (Ateneo - respondeculo : S-ro Delanghe, profesoro), Braine-le-Château (kun tre aktivaj amikoj CULLUS kaj PHILIPPON), en Menen (kun amiko Alain SCHELDMAN - skolto), en Bruselo (gvidanto, amiko BORREMANS), en Gent (kun la aktiva prezidanto DE BRUYNE). Ekzistis ankaŭ izolitaj membroj en Nieuwpoort, Brugge, Charleroi, kaj aliaj lokoj — mi ne plu bone memoras. Ekde 1945 aperis regule TJO-bulteno (Belga Sekcio). Ni havis libroservon, korespondservon kaj gazetservon. En 1947, mi foriris al Kongo, kie mi instruis en la Ateneo de Jadotville. S-ro CULLUS Philippe transprenis le ĉefperantecon de TJO por Belgujo. Sed iom post iom la tuta agado stagnadis. Mi ankoraŭ vidis CULLUS en 1949 dum mia feria restado en Belgujo, sed poste mi perdis ĉiun kontakton ! Kio okazis kun la tuta arĥivaro de la belga TJO-sekcio ? ? ? Estus tute logike ke tiuj arĥivoj venu en la manoj de la nuna belga sekcio de TEJO, ĉar fakte ĝi estas la feliĉa daŭrigo de la iama belga sekcio de TJO . . . ».

La ĉi supraj faktoj certe estas belaj memoraĵoj por pluraj personoj kiuj nun jam ne plu estas gejunuloj.

Sed tre bedaŭrinda estas la interrompo de la junulara aktiveco

inter 1952 kaj 1962. BEJA devis rekomenci ĉion ; multaj iniciatoj estis vanaj. Por eviti ke tia afero ree okazu, ni fidas je la helpo kaj firma apogo de ĉiuj personoj kiuj mem iam agadis en TJO !

Ni atendas multajn reagojn pro tiu-ĉi letero de S-ro Braet ! ! !

Skribu al Ivo DURWAEL,
Dolfijnstraat ,77
**Antwerpen**

---

**Historio de la Esperanto-Junularo en Belgujo . . . Kompletigaj notoj**

En la tempo kiun pritraktas samideano Braet, la Bruĝa Esperanto-grupo « Paco kaj Justeco », sekcio de la « Flandra Ligo Esperantista », konsistis fakte nur el gejunuloj. Ili organizis tiun unuan internacian tendaron en Blankenberge. Mi memoras ke mi mem donis du (eble tri) konferencojn kaj ke ni okazigis kampfajron. Tuj poste la eldono de monata revuo, destinita al gvidantoj de la junularmovado, kaj kies titolo estis « La Vivo », estis en la manoj de mi kaj de la meritplena S-ino Van Veenendaal-Bouwes. En ĝi mi prizorgis la rubrikon « Mondpolitiko » kaj S-ano Roelofs tiun de la « mondekonomio ». Sed tio lasta jam transpasas la landan movadon. La materia flanko de tiu organizo estis jam tiutempe en la manoj de S-ro Gr. Maertens.

Drs. F. Roose





RABATO POR ESPERANTISTOJ


**DENOVE ESPERANTO EN LA SVISA RADIO**

La Svisa Kurtonda Radiostacio, kiu bedaŭrinde devis komence de ĉi tiu jaro interrompi siajn Esperanto-elsendojn tradiciajn jam depost 1946, anoncas, ke ĝi denove elsendos en la internacia lingvo ekde la 7a de novembro 1965. Parolistoj estas la samaj kiel antaŭe, nome d-ro Arthur Baur, ĉefredaktoro en Bern, kaj Claude Gacond, instruisto en La Sagne/Neuchâtel. La elsendoj okazos laŭ jena plano :

| | | |
|---|---|---|
| Lunde | 12.00 (horo de Greenwich) | Baur |
| Merkrede | 12.00 (horo de Greenwich) | Gacond |
| Jaŭde | 21.15 (horo de Greenwich) | ripeto de la lunda elsendo |
| Sabate | 21.15 (horo de Greenwich) | ripeto de la merkreda elsendo |

La ondoj estas 48,31 kaj 31,46 m. Tagmeze krome 13,94, vespere krome 25,61 m. La daŭro de la elsendoj estas maksimume 8 minutoj.

La direkcio de la studio dankas al ĉiuj antaŭaj aŭskultintoj, kiuj bonvolis esprimi sian opinion pri la ĝisnunaj elsendoj kaj pri la interrompo. Ĝi petas ilin ankaŭ estonte konfirmi al ni la ricevon de niaj elsendoj kaj diri al ni siajn kritikojn. Ĉiu korespondanto ricevas regule nian ilustritan sendprogramon, kiu aperas dufoje en la jaro. Nia adreso estas : Sivsa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, Giacomettistr. 1, **3000 Bern 16**, Svislando.



# La Fondaĵo por la dis-vastigo de la informado „ Jaumotte Loquet "

En la lastaperinta numero ni publikigis la unuajn detalojn pri la starigo de tiu speciala Fondaĵo, kaj menciis jam la nomojn de kelkaj unuaj donacintoj. Intertempe ni atingis pli ol 100.000 Fr. !

Kiel speciala danko al tiuj kiuj unuavice, alportis sian helpon por plifirmigo de la « Fondaĵo », ni, ĉi -sube, publikigas ankoraŭfoje ĉiujn jam ricevitajn sumojn :

| | |
|---|---|
| **Gesinjoroj Maurice Jaumotte-Loquet** | **50.000 Fr.** |
| **Belga Esperanto-Federacio** | **25.000 Fr.** |
| **Gesinjoroj Gerard Debrouwere** | **5.000 Fr.** |
| **Antverpena Grupo « La Verda Stelo »** | **2.000 Fr.** |
| **Brusela Grupo Esperantista** | **2.000 Fr.** |
| **Lieĝa Grupo Esperantista** | **1.000 Fr.** |
| **Sinjorino R. Lecat (1/10 van de 10.000 Fr.)** | **1.000 Fr.** |
| **Gesinjoroj Carlos Tytgat-De Ketelaere, Antverpeno** | **1.000 Fr.** |
| **Sinjorino Livine Merckx, Antverpeno** | **1.000 Fr.** |
| **Fraŭlino Blanche Geers, Antverpeno** | **1.000 Fr.** |
| **Fraŭlino Elvire De Coene, Ekeren** | **1.000 Fr.** |
| **Sinjoro R. Mathieu-Plumhans, Lieĝo (Ougrée)** | **65 Fr.** |
| **Sinjoro J. Verstraeten, Antverpeno** | **1.000 Fr.** |
| **Anonime** | **5.000 Fr.** |
| **Sinjoro de Roover, Antverpeno** | **1.000 Fr.** |
| **Sinjoro H. Schumacher, Bruselo** | **1.000 Fr.** |
| **Bruĝa grupo Esperantista** | **500 Fr.** |
| **Gesinjoroj Debrouwere (por atingi la 100.000)** | **1.435 Fr.** |
| **Gesinjoroj Maertens - Mallet** | **1.000 Fr.** |
| | **101.000 Fr.** |

Kiu deziras helpi plifortigi la Fondaĵon, tuj ĝiru sian helpmonon al la PK 2914 29 de Maertens G., Sint-Kruis, kiu administras la Fondaĵon sub gvidado de la Prezidantoj G. Debrouwere kaj D-ro Denoël.

---

**Al niaj menbroj kaj legantoj**

**1966 estu por vi plej prospera**

**Ne forgesu Esperanton**

**Ni plu laboras fervore kaj fidas je via helpo**

**B.E.F.**



# RECENZOJ

**« Libro de Amo ». 264 paĝoj. Fortika bindo ; belaj papero kaj litertipo. Prezo : 4.60 Us. Dol. aŭ egalvaloro. Havebla l.a. ĉe F-ino Denise Bettman, 90, Faubourg St.-Honoré, Paris VIII. Poŝtĉekk. 21 879 48 Paris.**

Verŝajne kelkaj inter niaj legantoj konis la « Sekretaj Sonetoj » de Peter Peneter, eldonitaj de Literatura Mondo en Budapest ; kun ilustrajoj ! ! Jen la reeldono ; plus la verkoj de la filo. Tiuj legantoj komprenos ke ĉio devas resti nekonita pri tiu-ĉi libro : eldonanto, jaro de eldono (menciita : 1969 !), aŭtoro, antaŭparolanto ktp. Ni scias nur ke estas kelkaj geadmirantoj de tiuj du jam mortintaj verkistoj, kiuj decidis novan kaj efektive belan eldonon... sen ilustrajoj ! Nun, almenaŭ ni povas preni ĝin en mano senzorge, ekz. en aŭtobuso, vagonaro aŭ tramo, meze de ne-esperantista publiko. La titolo estas fakte ne ĝusta. Ĝi devus esti : libro de la seksa amo ; kvankam mi bone scias ke, laŭ ne malmultaj personoj, ekzistas neniu alia amo ol la seksa amo. Kion diri pri la libro ? Eĉ la « SAT-Amikaro » avertas ke « ili ne taŭgas por ĉies uzo. Ekzemple por daŭrigi la junulkurson... Sed por junaj geedzoj tio povas esti tre valora verko... » (Num. Aprilo-Majo ; paĝo 55). Ankaŭ la admirantoj, en la akompananta bileto, konscias ke ĝi « povas alkonduki kelkajn redaktorojn rigardi tiun verkon malmorala ». Ili klare vidis, ĉar, se ni legis nur laŭdon en « Nederlanda Esperantisto (julio-aŭg. 1965) (io kio mirigas nin flanke de la Nederlandanoj !), ni kontraŭe legis nur kondamnon en « Germana Esperanto-Revuo » (julio 1965) tiel ke ĝia librejo decidis ne plu vendi ĝin (Nr. aŭg. sept. 1965). Kaj fine, la libro mem, sur tri paĝoj, avertas tre insiste. Kiamaniere klarigi la fenomenon ke granda plimulto de la kristanoj nepre kondamnos tiun libron ? Por tion kompreni ni devas scii ke la kristanismo predikis la rezignon de ĉio monda, mondema kaj mondeca. Nur tiamaniere estas klarigeblaj la cenobitoj, monahoj, asketoj, stilitoj. Ĝeneralhoma trajto estas ke oni volas trudi al aliaj kion oni mem praktikas ; kun eĉ ia koleriĝo se tiuj aliaj ne volas sekvi. Tiel ekestis tiu spiritostato laŭ kiu ĉiu plezuro estas malbona, diabla ; ĉar ĝi fortiras nin de la pensado pri la postmorta ĉielo. Malgraŭ ke intervenis la periodo de la Renesanco, rekreskis poste la sama koncepto. La nuntempa homaro, ankaŭ la kristana, iras al alia koncepto. Restas tamen, laŭ mia konvinko, la principo ke ĉia ĝuo, plezuro, povas esti ne celo, nur rimedo ; de el la morala vidpunkto. Cetere nur tiel oni povas harmoniigi seksan kaj spiritan amon. Aliflanke mi konsentas ke ne tiu-ĉi libro — nek iu samspeca — devas prediki, ne devas esti traktato pri moralfilozofio. Tamen, vere, la libro ne taŭgas por ĉiuj ; ne por infanoj, kaj ne por personoj kiuj ankoraŭ neniam en sia tuta vivo pensis foje pri la signifo kaj la valoro de homaj psikaj fenomenoj kiel la ĝuo, kiel la sufero k.a.



La jena libro do pritraktas kaj glorigas la seksan ĝuon ; kaj faras tion sen ia skrupulo, tre detale priskribante, ne silentante ian ajn aspekton. Unu kriterio kiu devas nin priokupi estas tiu de la art-eco. Nu, la aŭtoroj verkis en arta, poezioplena maniero. Laŭ nia opinio, la filo superas la patron en tio. Ni devas admiri la klerecon de ambaŭ, la nuancoplenan sentovivon, la vortriĉecon, la bildajn komparojn ; ili ĉiuj estas trajtoj kiuj atestas pri granda verkokapablo. Tial la verko estas, nekontraŭdireble, literatura verko. Sed estas ankaŭ makuloj en tiu verko. Foje la poeto estas banala (p. 49) ; foje eĉ triviala (p. 42). Sur p. 69 ne nur la vorto sed la tuta poemo estas vulgara. Ne malofte li atestas pri « malbona gusto » (paĝoj 59 64 65 249 kaj la apogeon de tia « malbona gusto » ni trovis sur p. 67. Ĉu la aŭtoroj ne konsciis ke ili tiamaniere povas murdi sian propran verkon ? La fino de poemo devas esti iu plejsupro, iu kulmino. Poeto povas iel murdi sian poemon, kiel sur p. 42. Foje la aŭtoro eĉ deliras ; ekzemple kiam li parolas pri « sprita pugo » (? ! p. 175). Sonetoj XXXIV kaj XXXV, sur p. 71-72 diras malveron ; pruvo i.a. : St.-Francisko de Sales kaj Joanna de Chantal. Sed la verkinto, kiu multloke pruvas esti klera viro, eble ne konis tiujn du. Tute aliteme, mi devas admiri la vortriĉecon en la dua soneto. Mi trovis ankaŭ veron en la libro : « La vera am' neniam ja perversas » (p. 59). Tre ĝuste ! Sed en kio konsistas la vera amo ?

Mi konkludas. Post legado de la libro oni rajtas fari tiun demandon ĉu ĝi signifas pliriĉigon de la kulturo. En ĉi tiu kazo oni povas respondi relative pozitive : jes, en rilato kun la pliriĉigo de la terminologio de la fako erotiko ; kaj ankaŭ jes rilate kelkajn poemojn kiuj estas vere belaj, pense, sente, forme, literature. Estas bedaŭrinde ke ne aperis nur tiuj, kun forigo de la aliaj.

Drs. F. R.

**Teodoro S. Ŝvarc : « Maskerado ĉirkaŭ la Morto ». Eldonis « Stafeto » en la Kanariaj Insuloj, kiel nr. 25 en la Belliteratura serio (grando formato). 264 paĝoj kun bela, okulfrapa koverto de Jan Schaap jr. Prezo : 280 Us. Dol.**

Prof. Dr. J. Regulo eldonas tiel multe, tiel rapide kaj tiel zorge ke kaj eldonanto kaj publiko devas serioze prikonsideri la oportunon krei aboneblecon. Neniu eventuala abonanto bedaŭrus, ĉar se mi retrospekte rigardas ĉiujn ĝis nun aperintajn volumojn, mi konstatas ke ĉiuj estas valoraj, ne malmultaj eksterordinare valoraj, dum ke nur du seniluziigis min.

La aŭtoro de tiu-ĉi volumo estas la konata fondinto de la antaŭmilita « Literatura Mondo » en Budapest, kie li profesiis kiel advokato. Malgraŭ liaj evidente emintaj lingvaj kvalitoj, mi ne povas aprobi « . . . mi ne amas ŝerci . . » (p. 221) por : mi ne ŝatas ŝerci ; kaj same mi ne aprobas » . . . lernis hebree (p. 154) por : lernis la hebrean lingvon. Nenecesa uzo de akuzativo estas, laŭ mi, troa uzo ; ekz. p. 105, linio 21. Ankaŭ kelkfoje troa uzo de sufiksoj. Ekz. : imagajo kaj re alajoj, returniĝis (p. 113) kaj optimismeme (p. 157). Sur p. 205 mi trovis : estiĝis lume (kaj ne lumo). Tio estas efektive la ĝusta enbildigo de « het werd klaar », « il commençait à faire clair ». Lasta lingva rimarko : ne troviĝas klarigo por la vorto « estiel ». Efektive la vorto estas jam klarigita en la antaŭa volumo, la poemoj de L. Tarkony. Sed tio ne sufiĉas ! Oni ja ne estas devigita aĉeti ĉiujn librojn ! La signifo estas : identiga kiel.

Tiu-ĉi libro estas vera « document humain ». Ĝi rakontas pri la vivo en Hungarujo, kaj speciale de la Judoj en Budapest, dum la Germana okupado, dum la lasta milito. Vi mem ne dubos ke multaj ĉapitroj estas tre streĉaj. T. Ŝ. estas mem judo, tamen restas dum la tuta rakontado tre objektiva kaj larĝmensa, ekzemple, ne silentante pri malbonaj flankoj de propraj rasanoj. Forta specimeno estas tiu de la Judoj kiuj ekhavis de fremdaj ambasadejoj (i.a. la Hispana) protektantajn certigilojn, poste vendis ilin (!) kaj poste reakiris aliajn en tiuj ambasadejoj ! Kaj kion pensi pri jena frazo sur p. 175 : « ... se ĉe judo oni entute povas paroli pri homa digno. » (!).

Mi bedaŭras ke la libro ne aperis 15 jarojn pli frue. Mi pensas ke jam multaj legis similajn librojn kiuj iom ĉie aperis. Mi forte rekomendas.

Drs. F. R.

**Okakura Kakuzo « La Libro de Teo ». El la Angla originalo tradukis T. Nakamura. Presita sur kotonpapero kun bindo el bruna silko. 142 paĝoj. Eldono de KOSMO, kiu eldonis ankaŭ la « Japana Enciklopedieto ». Prezo : 2.50 Us. Dol. aŭ 9 Nederl. Guld.**

Ie en recenzo mi legis ke tiu-ĉi libro superas la « Enciklopedieto Japana ». Laŭ mi, ĝi ne superas, sed ĝi kompletigas ĝin. La enciklopedieto estas riĉa fonto de informoj. Tiu-ĉi libro ankaŭ, speciale pri la fama Japana te-ceremonio, sed ĝi donas ion pli : la idean bazon de tiu ceremonio ; kaj ĝi klarigas al ni la Japanan spiriton. La unua ĉapitro estas ia enkonduko en kiu ni lernas ankaŭ iom da historio. La tria ĉapitro, « Taoismo kaj Zenismo » postulas streĉan atenton ĉar ĝi enhavas multe da filozofio. Frapis min la akordiĝo kun la ĉefaj fru-Grekaj filozofoj de la 6a jc.a.K. Precipe ĝeneral-interesa estas la 5a ĉap. « Artaprecado ». Post legado mi demandis al mi kion juĝus la aŭtoro (kaj la samideaj Japanoj) pri niaj t.n. « Primitivoj » kaj pri la nuntempa arto, kiel « Dadaismo », « Surrealismo » k.a. Nia Flandra kritikisto Urbain Van de Voorde diris foje ke la diferenco inter nuna kaj plifrua arto estas ke la nuntempuloj nur pensas, skribas, pentras pri si mem kaj pri siaj propraj (malinteresaj) problemoj ; dum ke la antaŭdeknaŭjarcentuloj havis respektegon je ĉio kio ekzistas, kaj serĉis nur la veron. Nu, en tiu-ĉi libro mi legis : arto ne devas esti paroli pri si mem. La ĉap. « Floroj » parolas — per kia alta lirismo ! — pri la respektego al la floroj, kiuj ja havas ankaŭ animon, kaj propran vivon. Verŝajne vi scias kiel ĉio estas prizorgita per ekstrema zorgo, ĝis en la plej etaj detaloj. Tie ĉi ni komprenas la motivojn de tio. Jen la granda merito de la libro : ni komprenas la Japanan spiriton. Kiom da saĝo estas en tiu libro ! kaj kiom da poezio !

Drs. F. R.


P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj –
„securit" vitro
koloriĝitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

telefono 37.88.20


## PETICIO AL UNO

Ni konstatis dum nia administra kunveno en Bruselo de la 14.12.1965, ke nur kelkaj grupoj aŭ kernoj vere kunlaboris al tiu peticio, sed ke La Verda Stelo (kun S-ro Van Eynde, la nacia ĉampiono) firme tenas la rekordon : tio volas diri ke ni ĉiuj devas ankoraŭ dum kelkaj tagoj fari la maksimumon, kaj ensendi ankoraŭ ĉi-monate al UEA ; por povi kunmeti tutlandan raporton, bonvolu samtempe averti S-ron Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51 Sint-Kruis, pri tiu forsendo.




Eldonejo librejo
SONORILO

Kerkstraat 61
Brugge
P. C. Nr 1521.40


## A. DONACOJ POR NOVJARO :

| | |
|---|---|
| Akbar (orienta romano) — lukse bindita | 50,— |
| Anekdotoj pri Dante | 8,— |
| Hamlet (luksa bindita) (trad. de Zamenhof) | 135,— |
| Historio de Esperanto (de Courtinat) Vol I | 250,— |
| Historio de Esperanto (de Courtinat) Vol. II | 185,— |
| Historio de Esperanto (Edm. Privat) Vol. I kaj II | 78,— |
| Historio de Esperanto (Edm. Privat) en unu libro, luksa bindita | 94,— |
| Leteroj de Zamenhof (Vol. I kaj II) | 280,— |
| Lingvaj respondoj (Zamenhof) bind. | 115,— |
| Lingvaj respondoj (Zamenhof) broŝ. | 80,— |
| Memorlibro de Zamenhof (riĉilustrita albumo) | 180,— |
| Vivo de Zamenhof (Edm. Privat) - bindita | 45,— |
| Zamenhof (Majorie Boulton) - ilustrita (bindita) | 182,— |
| Zamenhof (Majorie Boulton) - ilustrita (broŝurita) | 150,— |
| Interpopola konduto (Edm. Privat) | 55,— |
| Judoj sen mono (bindita) | 70,— |
| Kalevala (tolebindita) | 350,— |
| Kiel akvo de l'rivero (interesa romano) (broŝurita) | 150,— |
| Kon-Tiki ekspedicio (riĉilustrita; bela bindita) | 175,— |
| Kulio (bindita) | 65,— |
| Leteroj al june poeto (Rainer Maria Rilke) | 18,— |
| Miru, Pensu, Ridu (tre taŭga por E°-grupoj) - bindita | 75,— |

**B. ESPERANTISTOJ GEPATROJ AĈETU ESPERANTLINGVAJN INFANLIBROJN: jen kelkaj titoloj:**

| | | |
|---|---|---|
| Novaj vestoj de la imperiestro (Andersen) | | 105,— |
| Sun Vukong trifoje batis la spiriton de Blanka skeleto | | 23,— |
| Infanoj ne konas limojn (artaj infanfotografajoj kaj teksto) | | 44,— |
| La fiera Generalo | | 11,— |
| Mi volis viziti lernejon | ) ĉiuj libroj estas | 8,— |
| La vulpo | ) | 5,— |
| La ora hakilo | ) riĉe ilustritaj | 11,— |
| Bela konvolvulo | ) | 6,— |
| Karpetoj transsaltas la Drakpordon | ) per multaj kolor- | 10,— |
| Kiel Lu Ban majstriĝis | ) | 4,— |
| Klopodoj de simioj por elakvigi la lunon | ) desegnajoj kaj | 12,— |
| Mojca Etulino | ) | 12,— |
| Stelita lampo | ) enhavas facilan tekston | 33,— |

**ATENTU !**

— Samideano deziras vendi maloftajojn kaj eĉ rarajojn (librojn kaj kompletajn jarkolektojn de revuoj) el propra biblioteko.
Kiu serioze interesiĝas skribu el la redakcio citante rekonliterojn SLB.

— DENOVE HAVEBLA: Svisa Esperanto Kalendaro 1966 (formato 27 × 34). Por ĉiu monato belega kolorbildo de Svisa pejzaĝo kaj dorsflanke detala priskribo pri la bildo en Esperanto).
dorsflanke detala priskribo pri la bildo en Esperanto.

**ANTVERPENO ESPERANTO-GRUPO « LA VERDA STELO »**
**Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.**

# GRUPA VIVADO

La 18an de junio okazis la diplomdisdono por la gelernintoj de la elementa kurso. Sukcesis en la ekzameno : F-ino Vekens, S-ro Herman, S-ino Verrijcken kaj S-ino Van Schevensteen. Nome de siaj gekunlernantoj S-ro Herman per mirinda teksto kaj en tre bona Esperanto dankis la profesoron, S-ron H. De Roover, kaj donacis al li belan Esperanto-libron. Al S-ino De Roover floroj estis prezentataj. Per varma pledado la profesoro reparolis dankante la gelernintojn pro la simpatia gesto kaj admonante ilin daŭre praktiki Esperanton ĉie kie ili vidas la eblecon. Por kompletigi la progamon S-ro R. Van Eynde prezentis kolorfilmojn dokumentajn parolatajn en Esperanto.

La 25an dum somera sfero 20 gesamideanoj faris la tradician ĉiujaran rondiradon de la antverpena foiro. Ili serĉis (kaj trovis) distrajon dum kelkaj horoj en la sinsekvaj amuzejoj. Oni konkludis la tuton en restoracio malantaŭ buteraj aŭ kremaj vafloj kun trinkajo plej refreŝiga.

La 2an de julio, malgraŭ la somera sezono oni sidis « Ĉirkaŭ la Fajro » por rakonti aŭ raporti pri libertempaj okazintajoj.

La 9an S-ro Eug. Paesmans gvidis 30 personojn plenatentajn tra parto de malnova antverpena kvartalo kaj konkludis la promenadon en la katolika marista domo « Stella Maris ». S-ro Van Eynde dankis la gvidinton per trafaj vortoj.

La 16an estis dediĉata al la « Turismo », kaj la programon prizorgis S-roj C. Borremans, R. Balleux kaj R. Van Eynde.

La kunvenoj de la 22a kaj la 30a staris en la signo de la libertempo. Multaj gemembroj estis for kaj tiuj kiuj jam revenis ankaŭ raportadis pri siaj ferioj.

La 6an de aŭgusto, dum vespero dediĉata al la « Sporto », S-ro R. Van Eynde, kiu dum diversaj semajnoj jam prezidis la kunvenojn pro malĉeesto de la Prez. S-ro Jaumotte (libertempante), plenigis la vesperon per rimarkinda kontribuo.

La 13an, pro antverpena kermeso, ne okazis kunveno.

La 20an kaj la 27an la libertempa sfero ankoraŭ ĉiam regis kaj kreis por la gemembroj la okazon plue raporti pri la neforgeseblaj feriaj tagoj kiuj tro rapide forpasis.

La 3an de septembro dum dokumenta filmvespero de S-ro R. Van Eynde nova filmo — esperante parolata — pri « La Forto por flugi » estis prezentata.

La 10an F-ino A. Geelen longe parolis pri « Kio estas la Chiro ? » kaj pere de lumbildoj skizis la ekzistadon kaj evoluon de tiu junularmovado en la katolika medio. Belstila lingvo, klara voĉo kaj senerara prononcado plue sukcesigis la vesperon.

Lundon, la 13an, por la nova elementa kurso en Belgiĉlei, enskribiĝis 11 gelernantoj. S-ro H. De Roover, kiel profesoro, faris la enkondukon kaj ankaŭ gvidos la tutan kurson.

La 17an, pro la morto de D-ro A. Schweizer, S-ino R. Lecat faris belegan paroladon pri tiu nobla homo kies ideoj kaj idealoj kvazaŭ estas samaj kiel tiuj de la esperantistoj kaj kiu konsekvence meritas la tutplenan dankon de la homaro pro sia senlaca laboro por la malfeliĉuloj de tiu ĉi mondo. S-ro P. Van Sitteren, Prez. de TANEF, Esperanto-Fako en la « Naturamikoj », kiu ĉeestis la kunvenon, bonvole raportis pri sia laboro en Kongreso de Kopenhago kaj kie li akiris la akcepton de Esperanto, kiel internacia lingvo, en la statutoj de la « Naturamikoj ».

Sabaton kaj dimanĉon, la 18an kaj 19an Esperanto-ekspozicio en la kadro de E.K.I.-Antverpeno okazis en Niel, komunumo en la antverpena aglomeracio. La urbestro, S-ro J. Wijn (senatano), 2 skabenoj kaj membroj de la urbestraro ĉeestis la malfermon de la ekspozicio. S-ro Wijn persone inaŭguris ĝin post kiam li estis laŭdinta la utilecon kaj necesecon de Esperanto. S-ro M. Jaumotte, Prez. de EKI, kiu ankaŭ estis enkondukinta la tuton, dankis per trafaj vortoj kaj komentariis serion da diapozitivoj kiuj klarigis la historion de Esperanto. Honorvino estis oferata. La publika intereso estis pli ol kontentiga.

La 24an la gemembroj denove ariĝis « Ĉirkaŭ la Fajro » en kiu kviza parto pri la librobutiko, la kunvenoj kaj programoj de la lasta monattrio estis ĉefa fakto. La premion akiris S-ro M. Du Bois.

La 1an de oktobro S-ro M. Jaumotte paroladis pri «-Svisujo », montrante multajn lumbildojn pri la bela lando de « Willem Tell ». Personaj impresoj kune kun multaj klarigoj pri turismaj sciindajoj, pri la strukturo de la lando, pri ĝia historio kaj popolo, pri pejzaĝoj neforgeseblaj pro beleco havigis al la eksterordinare multnombra ĉeestantaro kelkajn horojn da profunda ĝuo.

La 8an estis dediĉata al la gastronomia plezuro ĉar pli ol 30 verdstelanoj partoprenis al la mitulvespermanĝo en « La Coupe Glacée » kie — hazarde — nederlanda samideanino salutis la ĉeestantojn.

La 15an F-ino A. Enzlin faris detalan raporton pri la Univ. Esperanto-kongreso de Tokio kaj montris seriojn da lumbildoj kaj belegajn diapozitivojn kiujn ŝi komentariis laŭ vigla maniero. Multaj objektoj el la ĉiutaga japana vivo kaj kuriozaĵoj el la kulturaj medioj estis ekspoziciataj sur tabloj aŭ pendis ĉe la muroj. Post la kunsido multaj interesitoj informis pri aliaj detaloj.

La 22an S-ro Ivo Durwael paroladis pri « La Tago de la UNO » honore al la 20a datreveno de la fondiĝo de la UNO, kaj montris filmstriojn pri ĝia aktiveco kaj tiu de ĝiaj sub-organizajoj kiel Unesco, Unicef, k.t.p.

**FAMILIA VIVO :**

Naskiĝo :

En la juna familio de niaj gemembroj Ges-roj Paul De Roover - Klein naskiĝis unua infaneto. Al la feliĉaj gepatroj, al la same feliĉaj kaj simpatiaj geavoj Hendrik De Roover kaj al la aliaj parencoj ni prezentas niajn korajn gratulojn kun bondeziroj por bona kaj longa vivo en mondo plena je paco.

Nekrologo :

Kun emocio ni eksciis pri la subita morto de S-ro Jacques — patro de niaj fidelaj gemembroj Ges-roj Hugo Jacques - De Ketelaere. Al niaj bonaj geamikoj kaj parencoj ni esprimas niajn sincerajn kunsentojn en la profunda funebro.

**Ensendojn por la januara-februara numero ni petas antaŭ la 15.1.1966.**

## UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Budapesto 30.7 - 6.8. 1966

kotizoj

| Kategorio | gis 31.12.65 | gis 31.3.66 | post 31.3.66 |
|---|---|---|---|
| *Kongresano* | 770 | 840 | 910 |
| *Edz(in)o* | 385 | 420 | 455 |
| *Junul(in)o ĝis 20j.* | 294 | 322 | 350 |
| *Studentoj(20j ĝis 30j.)* | 476 | 518 | 581 |
| *Blindulo & gvidanto* | 385 | 420 | 455 |

Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kongresan (in)o | 700 | 770 | 840 |
| Edz(in)o | 350 | 385 | 420 |

## KARAVANO AL BUDAPEST

### Dimanĉo, 24.7.1966 - Sabato, 13.8.1966 - 21 tagoj

Eksciante ke la internacia kongreso okazos en Budapesto, mi ekĝojis, ĉar la kunvojaĝantoj de Sofia certe rememoras la specialan atmosferon de tiu ĉefurbo, kaj la belecon de ĝiaj monumentoj kaj konstruaĵoj.

Por la irvojo, mi decidis viziti la tutan Ĉeĥoslovakujon, de Pilsen al Prago, Olomouc kaj Lomnice, (Alta Tatro) ĝis Košice, apud la Hungara kaj Rusa landlimoj.

Kompreneble ke ni disponas pri nia autoĉaro por la vojaĝoj kaj la urbaj ekskursoj aŭ vizitoj en Hungarujo mem, kaj la reiro estos ne malpli vera ĝuo: Vieno - Salzburg - Berchtesgaden la majesta Kaisersgebirge ĝis Garmisch, Oberammergau kaj la romantika strato !

**Dimanĉo** 24.7.1966 : Foriro de el la diversaj urboj en nia lando ĝis **Würzburg**: 603 Km

**Lundo** 25.7.1966 : Würzburg - **Nürnberg** (vizito) - **Plzen** - **Prago** (384 Km)

**Mardo** 26.7.1966 : Restado en Prago, la ora urbo !

**Merkredo** 27.7.1966 : Prago - Olomouc: tiu lasta estas unu el la plej ravaj urbetoj de la lando (280 Km)
Ni tagmanĝas en Pardubice, la plej interesa urbo de Bohemujo.

**Jaŭdo** 28.7.1966 : **Olomouc** - **Tatranska Lomnica**; la **Tatromontaro** estas ĝis 2600 metroj alta, sed nur je surfaco de 26×15 Km kaj tre kruda, vera naturparko kaj por la bestoj kaj por la homoj (kiuj portas ĉiutage ankoraŭ la popolajn vestaĵojn de tiu regiono).

**Vendredo** 29.7.1966 : Ni nur vojaĝas 200 Km, ĉar ni volas ĝui belegan ĉirkaŭajon kaj la famegajn glacigrotojn en **Dobsina** (unika en Europo); tranokto en **Košice**, 70 Km de la rusa limo.

**Sabato** 30.7.1966 : Ni forlasas nun Ĉeĥoslovakujon post vizito de la tuta lando de okcidento al oriento. Al la kongreso tra la norda parto de Hungarujo (Miskolc).

**KONGRESSEMAJNO** : La elspezoj por tiu semajno ne estas enkalkulitaj en la vojaĝprezo, kiun ni poste priparolos, ĉar povas esti ke inter la kunvojaĝantoj estas diversaj opinioj pri loĝado. Mi povas rekte mendi loĝlokojn al la agentejo, por Hungarujo, en unua-klasa hotelo, se kelkaj preferas tiun sistemon; tiu grupo kiu mendas pere de mi, certe povos profiti de la aŭtoĉaro dum la tuta kongressemajno.

**Sabato** 6.8.1966 : Vizitante ankoraŭ parton de Hungarujo, ni transiras post dekdu tagoj da restado en la popolaj respublikoj de Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo, la landlimon de Aŭstrujo ; alveno en **Vieno.**

**Dimanĉo kaj lundo**
7 & 8.8.1966 : **Hofburg** - **Wienerwald** - **Schönbrun** - **Prater k.t.p. ! ! !**
La restado en la famega Vieno dum du tagoj kaj tri noktoj jam plene kontentigus nin kaj valorigus la tutan returnvojaĝon, se ni, post la urba beleco de la unika urbo Vieno ne havus la okazon por rigardi kaj ĝui ankoraŭ la ravajn pejzaĝojn kiuj sekvas.

**Mardo** 9.8.1966 : Ek al Salzburg, enpenetrante la ravan Salzkammergut, post vizito al la mondkonata abatejo de **Melk** (317 Km).

**Merkredo** 10.8.1966 : **Salzburg** kaj cirkaŭaĵo valoras la dediĉon de plia tago por viziti la urbon mem, tiu urbo de Mozart, situita ĉe la piedo de la Alpoj, kiuj ŝajnas abrupte halti por naskiĝi la fortifikaĵojn de Salzburg, neniam venkitaj. Ni daŭrigas al **Berchtesgaden** kaj la **Salminejo** (vizito).

**Jaŭdo** 11.8.1966 : Nur citante kelkajn nomojn, vi komprenos la ravecon de tiu tago, meze de la altmontaro: Berchtesgaden kaj **Königsee, Chiemsee, Bad Tölz, Mittenwald, Ettal, Garmisch.** Post tiu tago (nur 200 Km) de beleco kaj vizito al la **Zugspitze**, la plej impona spektaklo de la Alpoj, belegaj pejzaĝoj, ni kontente hejmeniros.

**Vendredo** 12.8.1966 : Vizitante ankoraŭ la faman Wieskirche, ni laŭ la romantika strato atingos la Neckar, por tranokti en Bad Wimpfen.

**Sabato** 13.8.1966 : Ni atingas laŭ la aŭtovojoj de Germanujo, nian landon, kaj iom post iom nia autoĉaro malpleniĝos (636 Km ĝis Bruĝo). Tiu alventago permesos al ĉiuj eksterlandanaj kunvojaĝantoj por ankoraŭ atingi sian loĝurbon vojaĝante la dimanĉon 14.8.1966.

**KONDIĈOJ : 15 tagoj tranoktado, manĝoj, vizitoj kaj ĉeesto al kulturaj vesperoj (laŭ la eblecoj), vizoj, vojaĝoj (minimume tri) en Hungarujo mem, ĉiuj ekskursoj en la urboj kie ni restas dum unu aŭ du tagoj, komforta moderna aŭtoĉaro kun 40 lokoj, trinkmono por la ŝoforo, unuklasaj hoteloj kie ni tranoktos: 8.000 Fr. Ni ne volas profiti sed krei internacian atmosferon pere de Esperanto kaj doni la eblecon viziti Budapeston laŭ la plej ideala maniero: senzorge, vizitante kaj ĝuante la vojaĝon mem, kontaktante kie ni povas kun la lokaj esperantistoj.**

**Edzino kaj familianoj**: pagas nur 7.000 Fr.

**malpli ol 20 jaroj**

**Personoj postulante unu-personan ĉambron, kie tie eblas :** 500 Fr. pli.

**Enskribo** : pagante 1.000 Fr. kaj kongreskotizon (ĝis 31.3.1966, 840 Fr. por kongresano kaj 420 Fr. por la edzino) al poŝtkonto : **2914.29 de Maertens G., Sint Kruis.** Eksterlandanoj povas pagi pere de UEA, centra oficejo.

Nunaj enskriboj kaj promesoj: 14 !

## NEKROLOGO

### Advokatestro Marcel ROOST

En la lasta semajno de oktobro, disvastiĝis en Antverpeno la novaĵo pri la morto de advokatestro Marcel Roost, eminenta figuro de la advokataro kaj de la profesora mondo.

Advokato Roost venis al Esperanto post la unua mondmilito, en kiu li estis dufoje tre grave vundita kaj operaciita de krani-borado. La sekvo estis ke lia granda invaliditeco malpermesis al li la larĝajn gestojn kaj voĉplialtigojn de la kriminalaj pledantoj... Sed des pli profunde il lernis kaj ekkonis la subtilecojn de la komerca kaj marista juroj, en kiuj li specialiĝis.

Liaj kolegoj vokis lin al la advokatestreco, kiun li digne plenumis, kaj la administrantaro de la Brusela Universitato al la Profesoreco.

La belga registaro rekonis la servojn de la iama militvolontulo, de la fortpesoneca advokato kaj de la eminenta profesoro per multaj ordenoj kaj ankaŭ la brita kaj franca registaroj tion faris pro lia agado en la dua mondmilito.

La Esperantistoj, precipe la membroj de « La Verda Stelo », bone konis lin ĉar, -se li en la lastaj jaroj ne plu regule povis ĉeesti la kunsidojn, -li tamen ĉiam venis kiam temis pri jubileo aŭ honorigo de veterano.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

# VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
# " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

## PRECIPAJ CENTROJ:

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |


— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint-Kruis Brugge —